

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

LA VENKO

•

NIAJ E-
KONGRESOJ

•

LA 9-A DE MAJO
EN REMEMOROJ
KAJ VERKOJ

•

„MILITO SEN
PAFO”

•

LA GRANDA
MISIO
DE METODIO

•

LINGVAJ
PROBLEMOJ

•

BELETRO KAJ
POEZIO

•

IMPRESOJ
PRI JAPANIO

•

„ANTITAB” —
ĈU HELPOS?



JARO 54 • N-RO 5 • MAJO • 85

FORPASIS KONSTANTIN ĈERNENKO

La 11-an de marto 1985 la sovetaj amaskomunikiloj dissendis tristan novaĵon: pro grava malsano forpasis Konstantin Ustinoviĉ Ĉernenko — elstara partia kaj ŝtata gvidanto, patrioto kaj internaciisto, konsekvenca batalanto por triumfo de la komunismaj ideoj kaj de la paco en la mondo.

De komsomola gvidanto kaj partia organizanto ĉe landlima posteno, ĝis ĝenerala sekretario de CK de KPSU kaj prezidanto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR — tia estis la vivo de Konstantin Ĉernenko. Sur la plej altaj partiaj kaj ŝtataj postenoj li plene elmonstris sian organizan talenton de gvidanto de Lenina tipo.

Konstantin Ĉernenko multe kontribuis por efektigo de la kurso al perfektigo de la evoluanta socialismo, por solvado de la gravaj taskoj de la ekonomia kaj sociala evoluo kaj por plialtigo de la bonstato de la sovetaj popolo.

Per siaj renkontigoj kaj interparoloj kun elstaraj ŝtatestoj kaj politikistoj el diversaj landoj Konstantin Ĉernenko kontribuis por plenumo de la partiaj decidoj por plibonigo de la internaciaj rilatoj, por serenigo de la internacia politika firmamento, por defendo de la monda paco. Li multe kontribuis ankaŭ por plua evoluo de la ĉiufanka kunlaborado kun la frataj socialismaj landoj. Kun la personeco de Konstantin Ĉernenko estas ligitaj la transiro al nova etapo de la socialisma ekonomia integriĝo, la stabiligo de la pozicioj de la socialisma komuneco, de la Varsovia Kontrakto.

La forpaso de Konstantin Ĉernenko estas granda perdo por la sovetaj popolo kaj por ĉiuj progresemaj homoj sur nia planedo. La hela memoro pri la homo-komunisto kaj gvidanto Konstantin Ĉernenko por ĉiam restos en la koroj de la bulgaraj laboruloj.

MIĤAIL GORBAĈOV — ĜENERALA SEKRETARIO DE CK DE KPSU

En la Plenkunsido de CK de KPSU, okazinta la 11-an de marto 1985, kiel ĝenerala sekretario de CK de KPSU estis unuanime elektita Miĥail Gorbaĉov — membro de la Politika Buroo de CK de KPSU, prezidanto de la Komisiono pri Eksteraj Aferoj de la Soveto de la Unio.

Miĥail Gorbaĉov estas naskita en 1931 en vilaĝo Privolnoje de Stavropola regiono, en kamparana familio. En 1955 Miĥail Gorbaĉov finis la juran fakultaton de la Moskva Ŝtata Universitato „M. V. Lomonosov“ kaj en 1967 — la Agrikulturan Instituton en Stavropol, akirante specialecon de agrar-ekonomiisto.

Dum pluraj jaroj Miĥail Gorbaĉov okupas gvidpostenojn en la Komsomolo kaj en la Partio en la Stavropola regiono, kaj de aprilo 1970 li estas unua sekretario de la Stavropola Regiona Komitato de KPSU.

Miĥail Gorbaĉov estas elstara aganto de la Komunista Partio de Sovetunio. Sur ĉiuj postenoj, kiujn okupis M. Gorbaĉov, li laboras kun la propra al li iniciatemo, energio kaj abnegacio, fordonas siajn riĉan sperton kaj organizan talenton por efektigo de la partia politiko, sinofere dediĉas siajn fortojn al la Lenina faro, al la intereso de la laboruloj.

AL MIĤAIL SERGEJEVIĈ GORBAĈOV
Ĝenerala sekretario
de CK de KPSU
Moskvo

Kara kamarado Gorbaĉov,

En la nomo de Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio kaj en mia propra nomo mi tutkore salutas vin okaze de via elekto kiel ĝenerala sekretario de CK de KPSU.

La bulgaraj komunistoj, ĉiuj laboruloj en Popola Respubliko Bulgario bone konas vin kiel sindonan filon de la granda sovetaj popolo, kiel elstaran aganton de la glora Komunista Partio de Soveta Unio kaj fidelan sekvanton de la senmortaj testamentoj de Lenin.

Ni firme kredas, ke la vivodona bulgara-soveta amikeco, la ĉiufanka kunlaborado kaj proksimiĝado inter BKP kaj KPSU, inter Popola Respubliko Bulgario kaj Sovetunio daŭrigos sian fruktodonan disvolviĝon kaj floradon por la bono de niaj frataj popoloj, en intereso de la monda socialismo.

Elkore mi bondeziras al vi, kara Miĥail Sergejeviĉ, fortan sanon, kreoenervion kaj grandajn sukcesojn en via tre respondeca agado!

*La 11-an de marto 1985,
Sofio*

TODOR JIVKOV,
Ĝenerala sekretario de
CK de la Bulgara Komunista Partio



LA VENKO

Al la sennoma soldato
de la sennoma altaĵo

En la strategiaj prilaboradoj, en la grandskalaj operacioj, atakoj kaj kontraŭatakoj li havis sian lokon sub la numero de sia armeo, divizio, pli malofte — de sia regimento. Li estis unu el la milioj, kiuj partoprenis la laŭvican atakon, por proksimiĝi per ankoraŭ unu paŝo al la venko — ankoraŭ tiel malproksima, nur en sonĝoj vidata.

Post multaj jaroj iu veterano, mezurinta per paŝoj la distancon kaj la tempon inter la komenco kaj la fino, diros: „Mi aŭdis birdojn kanti en la silento, birdoj, kiuj flugis trankvile en la senfino de la profunda blua ĉielo. . .“

Sur la placo antaŭ „Bolŝoj Teatr“, kie ĉiujare en la Tago de la Venko renkontiĝas partoprenintoj en la Granda Patrolanda Milito, li staris sola. Aliaj ĉirkaŭprenis unu la alian. Aliaj ploris. Aliaj jam rampis sub la fajro de la vekita rememoro. La soldato el dua bataliono de 167-a gvardia infanteria regimento estis sola. Kaj ekster la tempo. Eble en la marĉoj de Sivaŝ aŭ en iu forbruligita vilaĝo, okupita per bajonetoj, sed malproksime de la homoj, de la kantoj, de la ĝojo. . . Li ĉiam estis en la marŝkolono — maldensiĝanta kaj denove kompletigata, por ke estu ĉiam sur la tero dua bataliono de 167-a gvardia infanteria regimento; marŝkolono, en kiu vice kun la vivaj marŝis ankaŭ la mortintoj. Maldekstre estas junulo, kiu ankoraŭ ne spertis kio estas amikiso kaj revis konstrui domojn — grandajn belajn domojn, sed pereis jam en la unua batalo — li kuŝis kun larĝe malfermitaj ĉielbluaj okuloj, plenaj de doloro kaj surprizo. Apud li estas la serĝento, kiu jam estis tute sola en la mondo, kiu inter du bataloj aŭ en la maloftaj momentoj de ripozo en la postfronto tajlis infanludilojn, sed ja li ne havis infanojn! Li pereis ĉe la trapaso de Dnepro. Kaj antaŭ ĉiuj, en tute nova, ankoraŭ grincanta portepo, estas la leŭtenanto. Iom ridinda pro la kruada esprimo sur lia preskaŭ infana vizaĝo. Li sin ĵetis en la batalon kun la romano pri Korĉagin en sia soldata sako, kaj kunfandiĝis kun la

heroo de la soveta junularo. Oni pafmortigis lin en kvieta tago, kiam en la komunikoj pri la batalagoj estis nenio grava.

Ne plu estas la knabo.

Ne plu estas la serĝento.

Ne plu estas la leŭtenanto, kiu mem ekkantis „Leviĝu, land’ grandega. . .“

„ . . . al mortbatal’ leviĝu“ — tondris la eĥo laŭ la polvokovritaj militvojoj kaj en la neĝkovrita stepo, en tranĉeoj, en terkabanoj kaj malsekaj betonŝirmejoj; tondris kaj alvokis al lasta batalo milojn, milionojn da soldatoj, kiuj portis la venkajn standardojn.

Tio estis milito inter humaneco kaj hommalamo, inter lumo kaj mallumo, inter libero kaj perforto. Milito je vivo kaj morto! Kaj eĉ kiam iu sennoma plotono restis por ĉiam sur iu sennoma peco da tero, — tio tamen estis venko, sen kiu ne estus la granda venko, ne estus la flago flirianta super la Rajhstago.

Venko kun birdoj, kiuj kantas en la silento.

Venko, kiun sonĝis, sed ne ĝisatendis miloj, milionoj da soldatoj.

Ne ĉiuj estis bravaj kaj oferpretaj kiel Matrosov.

Ne ĉiuj estigis heroojn.

Sed en tiu milito — la plej terura kaj plej granda milito, kiun travivis la homaro, ĉiu soldato el la Soveta Armeo batalis ankaŭ por sia persona venko. Kaj ne nur venko kontraŭ la malamiko, sed ankaŭ en batalo kontraŭ sin mem. Kaj ne nur kiam li pagis por siaj fideleco kaj amo per la vivo!

La milito estas laceco kaj maldormado, seka panpeco kaj krevintaj pro soifo lipoj, tranĉeoj fositaj je alto de homa staturato, kaj tranĉeoj fositaj en ŝtona grundo, sub eksplodantaj minoj kaj obusoj — laboro, kian la paca vivo ne konas, ne finiĝanta kaj pli terura ol la batalo mem, en kiu ĉiu soldato estigas parteto de la tuto — hirtiĝinta, krueliĝinta, sinjorgesa — en la nomo de la venko. La batalo estas momento kaj supro, kiun la soldato atendas kaj en kies piedo li restas. La

*milito daŭras plu — sen li, sed pliriĉigita per
plua sennoma, sursemita per plumbo altaĵo, sur
kiu ankaŭ nun, 40 jarojn post la venko, ne ĝer-
mas floroj.*

La florojn metos ni.

*Kun profunda kliniĝo antaŭ ĉiuj, kiuj ne
ĝisvivis la momenton aŭdi, kiel birdoj kantas en
la silento de la venko!*

Petăr STANĈEV,
jurnalisto el gazeto
„Zemedeľsko znaĉe“

NIAJ E-KONGRESOJ

HRISTO GOROV,
prezidanto de BEA

Jam depost 80 jaroj la bulgaraj esperantis-
toj kunvokas siajn landajn kongresojn por pri-
diskuti organizajn, propagandajn kaj lingvajn
demandojn.

Malproksime en la pasinteco la kongresoj de
Bulgara Esperantista Asocio estis vizitataj
malmultnombro, ĉar ne ĉiu povis elspezi monon
por veturado kaj restado en la kongresurbo.
Apartaj entuziasmoj eĉ piediris por ĉeesti
kongreson. La lokaj kongresaj komitatoj pro-
ponadis plej modestajn kondiĉojn, sed tiutempe
la kongresanoj ne estis pretendemaj. Mi me-
moras, kiel ni kongresis en urbo Vidin (1929).
Ni dormis sur pajlo en iu lernejo, ekskursis al
la rumana urbeto Kalafat dank' al la bonvolemo
de bulgaraj kaj rumanaj doganistoj, kiuj ne
postulis de ni pasporton kaj doganmonon. Same
tiel modeste ni kongresis en Stara Zagora (1931,
en Sevlievo (1938) kaj aliloke.

Tiutempe ne ekzistis sistemo de delegitoj.
Ĉiu, kiu havis monon kaj deziron, veturis al
la kongreso kaj tie reprezentis sin mem aŭ sian
lokan societon. Reveninte hejmen, la kongre-
sanoj rakontis al siaj samsocietanoj siajn ne-
forgeseblajn impresojn.

La antaŭmilitaj kongresoj faris por nia afero
veran reklamon. Verdaĵoj flortis ĉe la
stacidomoj kaj ĉirkaŭ la kongresejoj. Iufoje
oni formis kolonojn kun verda standardo ĉe-
frunte. Tian kolonon ni formis dum la 14-a kon-
greso en Plovdiv (1927). Kiam ni atingis la
centran placon, nin haltigis deĵoranta polica-
no. Kiuj vi estas? — miris li, vidante la stan-
dardon kaj aŭdante kanton en nekonata lingvo.
Li miris, kion entrepreni. Fine li venis al la
konvinko, ke ni apartenas al iu novbakita par-
tio kaj salutis nin, tuŝante per fingroj la vi-
zieron. . . Dum tiu kongreso mi la unuan fo-
jon alparolis fremdulon, nome la anglon Er-
nesto Yelland, kiu kune kun sia juna edzino
Tereza vizitis la internacian kongreson en Le-
ningrado. Revenante hejmen tra Istanbul, ili
traveturis nian landon kaj vizitis la kongre-
son en Plovdiv. Ni, novbakitaj esperantistoj,
ĉirkaŭis la karajn gastojn kaj penis konver-
sacii. Ni estis feliĉaj konstati, ke la gastoj kom-
prenas nin. . .

Ĉion ĉi mi rakontas, por ke la junaĝaj kon-
gresanoj povu kompari la iamajn kongresojn

kun la nuntempaj. La antaŭmilitaj kongresoj
apartenas al la infaneca periodo de nia movado.
Tiu ĉi stato iom post iom ŝanĝiĝis post la Naŭa
de Septembro. Laŭ la nuna statuto la societaj
aŭ distriktaj estraroj elektas delegitojn, kiuj
prezentas siajn rajtigojn al la kongreskomi-
tato kaj rajtas diskuti organizajn kaj aliajn
demandojn, partopreni la elekton de gvidor-
ganoj kaj esti elektataj. Ankaŭ gastoj parto-
prenas, sed iufoje ili superas la nombron de la
delegitoj kaj tiam la kongresoj estas tre bruaj. . .

Ornamo por niaj kongresoj estas la ĉeesto de
reprezentantoj de landaj asocioj el najbaraj
aŭ malproksimaj landoj. Tiam la etoso estas
sufiĉe internacia.

En la unuaj jaroj post la Naŭa de Septembro
laŭtradicie la kongresoj okazis ĉiujare: en Sofio
(1945), en Asenovgrad (1946), en Plovdiv (1947)
kaj en Jambol (1948). Post tio la movado ek-
stagnis kaj nur en 1956 okazis la 32-a landa
kongreso. Nun ekalternis kongresoj en ĉiu dua
jaro: Varna (1958), Veliko Tŕrnovo (1960),
Burgas (1962) kaj Pleven (1964).

La ofta okazigo de la landaj kongresoj ba-
naligis ilin. La kongreso en Pleven decidis mal-
oftigi la landajn kongresojn kaj, kompanse,
ĉiujare organizi kulturajn aranĝojn. Kun gran-
da sukceso la junulara sekcio komencis or-
ganizi festivalojn, kie gejunuloj kantas kaj
deklamas, oratoras. Sekvis recitaloj de Botev
kaj Vapcarov, regionaj kaj interurbaj renkon-
tiĝoj en Plovdiv, Ruse, Varna, Kubrat kun in-
ternacia partopreno, la scienc-praktikaj kon-
ferencoj en Sumen (1981), en Sofio kaj Pernik
(1982), V. Tŕrnovo (1982), Stara Zagora (1983)
kaj en Velingrad (1984). Tre variigas la mova-
don la kursoj kaj aliaj aranĝoj de la Internacia
Somera Universitato en V. Tŕrnovo.

Nun la financa stato permesas al centoj
da bulgaraj esperantistoj viziti kongresojn en
aliaj eŭropaj ŝtatoj, eĉ en Brazilo kaj Kanado.
La ses internaciaj kongresoj, kiuj okazis en
nia lando depost 1963, prezentis unikan oka-
zon por interamikiĝo.

La 41-a kongreso malfruiĝis je unu jaro pro
la 36-a kongreso de IFEF. La Centra Estraro
decidis prokrasti la landan kongreson por
pli bone organizi la internacian kongreson de
fervojistoj-esperantistoj, kiun ĉeestis pli ol 400

fremdlandaj kongresanoj. Ni esperas, ke la membroj de BEA pardonos al ni tion.

La 41-a kongreso de BEA okazos en la ĉefurbo de socialisma Bulgario. Gastiganto estas la organizaĵo de la sofiaj esperantistoj. Prezidanto de LKK estas doktorino Cvetana Stamenova, kiu estas ankaŭ prezidanto de la Urba Estraro de BEA. LKK faras ĉion eblan por

modela okazigo de la kongreso.

Al ĉiuj kongresanoj kaj gastoj ni deziras agrablan pasigon de la kongrestagoj. Ni kredas, ke ili revenos hejmen kun bonaj impresoj kaj entuziasmo por aktiva laboro sur la nova vojo, kiun ekiris nia Asocio en takto kun la sepmej-laj paŝoj de nia popolo al scienc-teknika progreso!

9-A DE MAJO — TAGO DE LA VENKO SUPER FAŜISMO



Eterna amikeco

Ie mi legis, ke la tempo efikas sur la rememorojn, kiel la patino sur valorajn objektojn — kovras ilin per verdeta kovrilo, kiu plialtigas ilian valoron, ĉar ĝi vualis ilin per la nereal sekreto de la forpasintaj dekjaroj. En iu kaŝita angulo de nia konscio kuŝas la pasintaj travivaĵoj — kiel malnovaj ornamaĵoj zorgeme gardataj en bunta kesteto kaj montrataj nur en solenaj festotagoj.

9-a de majo — la tago, en kiu la elturmentita homaro denove ekspiris libere post la kruele sangverŝa milito ĉiam revenigas min al la jaroj, kiam ni por unua fojo vidis la bravajn sovetajn soldatojn kun kvinpintaj ruĝaj steloj surfrunte.

Tiam mia patro, dentkuracisto, laboris en urbo Sliven. Li bone posedis la rusan lingvon kaj estis parolema kaj sprita homo. En la komenco kiel pacientoj, poste kiel bonkoraj amikoj, en nia hejmo preskaŭ dum la tuta tago venadis sovetaj oficiroj kaj soldatoj. „Bonan tagon, doktoro, la vetero estas malbona. Ni pensis, pensis, kaj alvenis al nia dentisto.“

Multfoje mi demandis min tiam, kion faras tiuj ĉi homoj ĉiam en la kabineto de mia patro. La bulgaroj estas gastamaj homoj. Ĉu ili ne havas dommastrojn, kiuj povus inviti, paroligi ilin. Mia miksa kun infana scivolemo intereso al tiu ĉi armeo, ĵus elirinta el la tranĉeoj, vivinta kvar jarojn en senĉesa duelo kun la morto, retenis min longe apud ili. Post multaj jaroj mi

eksciis, ke ilia armetrupo restadis en tendoj en la regiono de la Mineralbanejoj de Sliven, la ĉiutuno estis malvarma kaj pluva, kaj tiuj soldatoj soifis hejmece atmosferon. La parolema Vasilij Veliĉo el Kievo malkovris la sekreton: „Jordanka, via patro regalis nin per „milinki“ kaj turka kafo, post la laboro invitis nin en restoracion, dolĉaĵojn, kinejon. . .“

Post nelonge ilia armetrupo devis forveturi al la fronto, kie la bravaj sovetaj kaj bulgaraj armeoj liberigis urbon post urbo, vilaĝon post vilaĝo.

Niaj novaj amikoj, kaŝante la malĝojon pro la disiĝo per ekscito, alvenis kun streĉitaj uniformoj kaj poluritaj botoj por adiaŭi nin kaj deziris fari foton „por memoro“. Ili prenis la fotojn kaj forveturis kun promeso baldaŭ skribi pri siaj novaĵoj.

La milito finiĝis, la ruĝa standardo ekflirtis super la Rajhstago kaj metis finon al la mito pri la „elektita raso“, kiu konsideris la slavojn kiel sterkon por estonta „germana Eŭropo“, tiuj slavaj popoloj, kiuj naskis Lenin, Tolstoj, Gorkij Ĉajkovskij, Chopin, Botev, Levski, Dimitrov.

La jaroj pasis nerimarkite, ĉiuj vivis okupitaj de siaj propraj zorgoj. Nur mia patro de tempo al tempo malŝlosis la tirkeston, en kiu gardis dokumentojn, valorpaperojn kaj aliajn aĵojn, kiuj havis por li apartan valoron. Inter ili estis ankaŭ la foto kun la grupo da sovetaj oficiroj kaj serĝentoj, inter ili — mia patro metita digne en la mezo, kaj ie flanke ankaŭ mi — kun du maldikaj harplektaĵoj sur la ŝultroj.

Li longe rigardis la foton, menciis ilin laŭnome kaj demandis sin: „Kio okazis kun tiuj homoj, kial neniu el ili skribis, ĉu ili estas vivaj kaj kie estas nun?“ Sur lia maljuniganta vizaĝo trakuris rideto, kvazaŭ antaŭ li revivigis tiuj junaj, gajaj, sinceraj knaboj, invadintaj kiel printempa vento nian hejmon.

Al ni ofte ŝajnas, ke la vivo estas griza, monotona, kaj ni vivas sen sopiroj, en la teda atmosfero de indiferenteco. Sed io sensignifa — renkonto, vorto, letero aŭ apenaŭ kaptita melodio vekas en niaj animoj malproksiman rememoron traŝoviĝintan tra la tavoloj de la

jaroj kiel neatendita amika saluto. Tiel efikis sur nin la unua letero de nia Aleksandro el Lvov — la unua informo post 30 jaroj.

Unu jaron post la unua letero alvenis ankaŭ Aleksandro mem kun sia edzino. La singena kaj mallerta junulo transformiĝis en instruitan kaj spritan kunparolanton. Li kaj ankaŭ lia edzino Taisja tuj gajnis la korojn de ĉiuj. Post 30 jaroj ni denove faris „foton por memoro“.

Jus adiaŭinte Aleksandron, alvenis sciigo, ke Vasilij Veliĉko ripozas kun sia edzino en la Mineralbanejoj apud Sliven. La sekvan tagon mi estis jam ĉe li. Renkontis min eksplodo el ekkrioj, sed post momento mi devis alvoki helpe mian tutan sinregadon! Malfeliĉa Vasilij! En la kruela batalo por Berlino lia tanko ekbru-

lis. Estis vera miraklo, ke li restis viva. Kiam ili alvenis gaste al mi en Jambol, ni ankaŭ faris „foton por memoro“.

Nun mi siavice, kiel iam mia patro, rigardas la fotojn — ni ĉiuj havas ĉirkaŭ la okuloj reton da sulketoj, en la hararo brilas argentaĵfadenoj, sed niaj koroj restis junaj por la sinceraj amikaj sentoj, neestingiĝintaj en daŭro de pli ol kvardek jaroj.

Mi scias, ke tiu ĉi okazo ne estas neordinara. Verŝajne multaj estas la bulgaraj kaj sovetaj civitanoj, kiuj „retrovis sin“ denove post multaj jaroj, sed mi scias, ke tio estas la plej brilaj fadenoj en la riĉa kaj bunta teksaĵo de la bulgara-soveta amikeco!

D-rino JORDANKA POPOVA

RUĴICA

(Vera okazaĵo)

La pasintan tagon nia blendita esplorbataliono, kiu partoprenis la disbaton de la germana elita divizio „Prinz Eugen“ ricevis ripozon. Jus niaj kontraŭaviadilaj kanonoj forpelis la germanan esploraviadilon, kiu impertinente „pendis“ super urbo Kurŝumli, kaj la aŭtuna vespero falis sur la urbon. La kuiristo plenigis niajn telerojn. Sidiĝinte en malgrandaj grupoj, ni komencis vespermanĝi. Dum ni manĝis, mi, Dragan kaj Evĝeni — la skipo de nia blendita aŭtomobilo, rimarkis ke proksime de ni staras malgranda knabineto kaj rigardas nian „mangotablon“. Estis malvarme. Si estis nudpieda, en vestoj maldikaj kaj mallongaj. Siaj vangoj estis palaj kaj kavaj, la okuloj — nigraj kaj grandaj. Si estis bela kaj sendube tre malsata. Ni ekdemandis ŝin pri ŝia nomo.

— Ruĵica, — respondis ŝi honteme, sen deloki la rigardon de la nutraĵo. Ni donis al ŝi unu el niaj teleroj kun mangaĵo kaj grandan panpecon. Si iomete hezitis, poste prenis ĝin kaj, sidiĝinte apud la muro, komencis manĝi apete. Kiam la kulero fariĝis superflua, ŝi lasis ĝin kaj per panpecetoj finmanĝis la restintan sur la fundo de la telero mangaĵon. Ni estis kontentaj, ke ni nutris tiun malsatan infanon, ĉar ni bone sciis, kio estas malsato.

Sekvis demandoj. Ruĵica respondis mallonge, per tremanta voĉeto. El ŝia konduto ni komprenis, ke ŝi havas deziron iri hejmen. Si diris, ke havas patrinon kaj malgrandan fratinon. La patro estis mortigita de la faŝistoj. Ni do-

nis al ŝi panon kaj kelkajn viandkonservaĵojn kaj ŝi foriris.

En la urbo ni restis kelkajn tagojn. Ruĵica venis ŝiutage kaj manĝis ĉe ni. Si denove forporis nutraĵon hejmen. Poste ni direktiĝis al Kosovo, sen povi adiaŭi ŝin.

Ni atingis Albanion. Poste la militvento dispelis nin al diversaj lokoj. Post la venko nia bataliono enloĝis en Plovdiv.

Foje, je vesperiĝo, ni marŝis laŭ la strato. Kontraŭ ni marŝis en vicoj jugoslaviaj infanoj. Ili marŝis kaj kantis. Ni haltis por iom rigardi ilin. Tiutempe Bulgario donis azilon al la orfoj de la najbara elsuferinta popolo.

Subite unu knabineto forlasis la kolonon kaj ekkuris al ni. Estis Ruĵica.

— Onklo Dragan, onklo Dragan, — kriis la knabineto kaj rapide ekpendis sur la kolo de mia kamarado. Rekoninte min, ŝi lasis Draganon kaj ĉirkaŭprenis min. La kolono haltis. Scivolemaj urbanoj amasiĝis ĉirkaŭ ni. Venis la instruistinoj kaj ion diris al la infanino. Ruĵica rapide rakontis pri ni kaj pri la tagoj en Kurŝumli.

— Venu, venu ĉe ni foje, — invitis nin la instruistinoj kaj preninte Ruĵica je la mano, iris post la kolono. Ruĵica longe ŝvingis per mano, ĝis kiam la grupo malaperis.

En la okuloj de Dragan mi vidis larmojn. Mi ne scias, ĉu li vidis la larmojn en miaj okuloj.

ANĈO ANĈEV

LA LIBERIGANTINO

La popolo ekribelis. La libereco naskiĝis. Gojo plenplenigis la korojn.

Nia bataliono kantonmentis apud flughaveno Boĵuriŝte, atendante ordonon forveturi al la fronto. Estis posttagmeze. Flanke de la Balkano ni aŭdis bruon de aviadiloj kaj post

nelonge aperis la unuaj grupoj da aviadiloj. Ili rapide alteriĝis. Sur iliaj grize-verdaj flugiloj brilis ruĝaj kvinpintaj steloj. „Sovetaj! Ili alteriĝos!“ — kriis la soldatoj.

Ĉiuj ekkuregis al la flughaveno, ĉiuj volis vidi kaj renkonti la liberigantojn. Kurante al la

aviadiloj, mi prezentis al mi la ruĝarmeanojn — belaj grandstaturaj, larĝsultraj viroj.

Mi alproksimiĝis al ĵus alteriĝinta ĉaŝaviadilo. La lukso malfermiĝis rapide kaj el tie montiĝis la aviadisto, kiu rapide deprenis sian pilotan ĉapeton, kaj por nia plej granda miro la vento de la ankoraŭ turniĝanta helico flirtiĝis mirinde belan blondan hararon. Estis virino. Juna, bela. Ŝi energie saltis sur la flugilon, vestita en soldata uniformo. Ni rigardis ŝin kvazaŭ en sonĝo. La junulino-piloto ridetis, svingis per mano kaj salutis nin: „Saluton, kamaradoj!“

„Milito sen pafo“

(Historia dokumenta filmo)

Estis la fino de aŭgusto 1944.

Daŭris plu la sangverŝaj bataloj de la Ruĝa Armeo kontraŭ hitleraj milittrupoj sur la teritorio de Rumanio. La sovetaj soldatoj venkis en la historia militoperacio en la regiono de Jaŝ — Kiŝinev kaj rapide direktiĝis al la bordo de Danubo.

La 6-an de septembro 1944 la Soveta registaro proklamis militon al la monarko-faŝistaj regantoj de Bulgario, aliancanoj de Hitlera Germanio.

La 9-an de septembro 1944 la registaro de la Patrolanda Fronto kaj la Centra Stabo de NOVA (Popolliberiga Ribelula Armeo), unuigantaj ĉiujn progresemajn fortojn de la bulgara popolo, efektivigis la socialisman revolucion, kiu por ĉiam renversis la monarko-faŝisman reĝimon en la lando. La nord-orienta landlimo de Bulgario estis malfermita por la venka Ruĝa Armeo. La simbola „milito“ inter Sovetunio kaj Bulgario finiĝis sen pafado kaj viktimoj. „Milito sen pafo“ — tiel ĝi eniris la analojn de la Dua Mondmilito.

La bulgara popolo entuziasme akceptis siajn liberigantojn el sub la faŝista jugo. Laŭ malnova slava popolkutimo la sovetaj soldatoj ĉie estis bonvenigataj per pano kaj salo, la popolo ornamis ilin per floroj. . .

„Milito sen pafo“ — tiel nomis sian filmon la kinoreĝisoro-dokumentisto Vâlĉan Vaĉanov — bakalaŭro de la Tutsovetia Ŝtata Instituto de Kinematografio (VGIK), disĉiplo de la fama sovetika kinoreĝisoro Miĥail Rom. Sonigita en kelkaj fremdaj lingvoj, la filmo estas projekciota ne nur en la televido kaj en la kinejoj de Bulgario, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj. Ĝi estos unu el la ĉefaj eroj en la kultura programo de la XII Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj, okazonta en Moskvo ĉi-somere.

Preskaŭ 20 jarojn V. Vâlĉanov elserĉis, esploris kaj kolektis film- kaj fotodokumentojn, sur kiuj estas fiksitaj la gloraj historiaj eventoj en la unuaj tagoj post la socialisma revolucio en Bulgario. Lia filmo „Milito sen pafo“ vekas grandan intereson ĉe spektantoj el diversaj generacioj.

Sur la batalkampoj en Jugoslavio kaj Albanio, dum la bataloj kontraŭ la hitleranoj mi havis eblecon militi ŝultro-ĉe-ŝultro kun sovetaj oficiroj kaj soldatoj. Mi aŭskultis la fortegan tondradon de la ruĝa artilerio. Mi aŭdis longan kanonpafadon de malsuprenflugantaj sovetaj aviadiloj. Sed kiam oni parolas pri niaj liberigintoj, mi ĉiam unue rememoras pri tiu sovetaj junulino-piloto, kiun mi vidis en tiu neforgesebla tago de la unua renkontiĝo kun niaj liberigintoj.

ANĈO ANĈEV

La reĝisoro majstre uzis la eltrovitajn filmmaterialojn, unuigante ĝin en kompletan filmrakonton.

En sia filmo V. Vâlĉanov uzas ankaŭ unikajn, nekonatajn ĝis nun filmmaterialojn de sovetaj militfilmistoj-dokumentistoj. La aŭtoroj de la filmo (scenaristo — Antoaneta Velĉkova, kameraisto — Miroslav Rusinov kaj konsultatoj-redaktoroj — kapitano III rango Bojidar Slavov, la popola artisto de USSR Vladislav Mikoŝa kaj la laŭreato de ŝtataj premioj Aleksej Lebedev bonege kombinis malsamajn laŭ periodoj kaj karaktero filmajn kronikojn en unu artan tuton.

La filma rakonto estas gvidata en unua persono — en la nomo de la aŭtoro, kaj iom pli poste transformiĝas en dialogon de partoprenintoj en la historiaj eventoj — filmistoj kaj militistoj.

La dramaturgio de la filmo estas konstruita kiel monologa rememoro de la iama militestro de la havenurbo Varna — la unua vic-ministro de la defendo kaj ĉefmarŝalo de la artilerio de USSR Vladimir Fjodoroviĉ Tolubko. En tiu ĉi monologo enplektiĝas la rememoroj de la restintaj vivaj sovetaj filmistoj, kies dokumentajn filmmaterialojn oni uzas en la filmo. Kaj eĉ hodiaŭ — kvardek jarojn post la venko super la faŝismo kaj kapitalismo en Bulgario, tiuj ĉi filmaj dokumentoj emociigas ĉiun spektanton.

Mi finas miajn koncizajn notojn pri la filmo per la vortoj de unu el ĝiaj ĉefaj herooj — marŝalo Tolubko:

„En la historio de ĉiuj militoj tiu estis la plej mallonga, milito sen pafado, sen viktimoj!...“

Tiu fakto denove pravas la tradician, sanktan fratan amikecon de la bulgara kaj sovetaj popoloj. Ĝi estas brile montrita en la filmo pri la ekskluzive komplika periodo de la Dua Mondmilito.“

Kaj mi aldonus: ni ĉiuj estas ege dankaj al la kreantoj de tiu bonega historia filmverko.

DONĈO AĤTROV



BALADO PRI LA SOVETA SOLDATO

Li estis

ankoraŭ knabo,
kun du miozotoj-okuloj.

En ili la nuboj petolis
senlace en gajo.

En lian hararon,
surŝutitan per oro aŭtuna,
betuloj alkroĉis
branĉetojn petole.

Li estis

ankoraŭ knabo,
kun manoj
tempeste lertegaj.

La lipoj
ŝvelintaj de freŝa juneco,
nur sonĝe kisitaj,
disfloris
en rusan homaman rideton.

Tra l'vasta

neĝa kampar'
lian kanton
disportis la vento.

Li estis

ankoraŭ knabo
kaj restis por ĉiam plenaĝa,
farita aĝulo post pafo komenca.

Li estis

la sama soldato,
kun firme rigora vizaĝo,
fluganta atake
kun voko „Por la Patrolando!“

En liaj okuloj

jam mankis la gaja nubaro,
kaj brulis milito en ili.

En siaj okuloj

li portis
la stepon rusian bombitan,
vilaĝojn bruligitajn,
ruinojn de urboj
kaj iun timplanan
malsatan knabinon,
ho, kiu fortike tenante la pupon,
silente
kaj vane
ŝerĉadas
patrinon.

Li pasis tra miloj da verstoj,
trairis li multe da landoj.

Li tamen ne povis forgesi
ĉi tiun silentan malsatan knabinon.

Li estis soldato

kaj viro,
sed ankaŭ — bonkora hom'.

Samkiel infano li ploris

pri sia brava patro mortinta
antaŭ li en batalo.

Li longe silentis

kun larmoj libere fluantaj,
kliniĝis profunde
kaj mute li staris
por lasta honoro
rigarde
al Panjo-Patrio.

Li estis

la sama soldato
kun lipoj iĝintaj senkredaj kaj blankaj,
kun teruritaj okuloj,
kiu malfermis la pordojn
de la koncentrejo faŝista.

Li venis

Berlinon
samkiel miraklo
pasinta tra l' ega sufero.

Li estis kun koro
droninta en tristo
kaj tamen restinta
tre mola kaj ĉasta.

Li foje

eĉ montris rideton,
ĉi tiun homaman rideton
al iu malgrasa germana knabino,
ĉar ŝiaj okuloj similis
al tiuj restintaj en stepoj rusiaj.

Li venis

Berlinon
post kugloj, tranĉeoj kaj morto,
post festo de l'homoj
kun lingvoj malsamaj,
al kiuj

li donis liberon,
al kiuj li portis
la pacon kaj vivon
je l' kosto

de sia kar-patro,
de tiuj infanoj
restintaj sen siaj patrinoj,

je l' kosto
de sia rompita koro,
je l' kosto
de la bruligita soveta ter'.

Li venis

Berlinon,
samkiel la sun' enfabele alvenas,
venkinta malican fortargon.

Li estis

ankoraŭ knabo
kaj mortis en lasta atako
majesta,

per polvo batala fumajita,
kun du miozotoj-okuloj
kaj rusa homama rideto.

Vi, tero fremdlanda,

ĉu estas sufiĉe vi varma,
por ke ne frostadu
la brava heroo en sia dormado?

Vi, floroj,

ĉu estas sufiĉe aromaj,
por ke li sentu la stepon rusian?

Vi, panjo tre fora,

etendu la manojn
al vento,
por ke vi eksentu
la kisojn de ni,
por ke vi akceptu
kliniĝon de ni!

Tradukis: Nikola PILEV

LA GRANDA MISIO DE METODIO



La 6-an de aprilo j. k. finiĝis 1100 jaroj post la morto de Metodio — la granda slava instruanto kaj kleriganto. Li estis la homo, al kiu la mondo ŝuldas — ne malpli ol al lia frato — Konstantino-Cirilo la Filozofo, la defendon kaj savon de ilia granda nobla faro — kreo kaj disvastigo de la slava alfabeto, de la slava literaturo lingvo kaj de la slavaj libroj.

Tiu ĉi granda datreveno estas solene celebrata ne nur en Bulgario — la lulilo de la slava kulturo, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj.

Ĉi-sube ni proponas al niaj legantoj fragmentojn el la biografio de Metodio, verkita de unu el liaj disĉiploj, la bulgara mezepoka verkisto kaj kleriganto Kliment Ohridski (IX jc).

De lia eksteraĵo. . . vidiĝis, ke li devenas el bona kaj estimata familio, jam delonge konata al Dio, al la caro kaj al la tuta regiono de Tesaloniko. . .

Fine la caro, eksciinte pri lia saĝo, transdonis al li la *slavan princlandon*, por ke li regu ĝin, kaj mi diras — li kvazaŭ antaŭvidus, ke li sendos lin (Metodion) kiel instruanton kaj unuan arkiepiskopon de la slavo — por ke li ekkonu la slavajn kutimojn kaj iom post iom ekamu la slavojn.

Ekestis tia tempo, kiam la caro Mihail III sendis por la Filozofo, lia frato, kaj ordonis ke ili kune estu ĉe la hazaroj, ĉar tie estis hebreoj, kiuj blasfemis la kristanan kredon. Dirante: „Mi estas preta morti por la kristana kredo“ — Metodio konsentis kaj iris kun sia pli juna frato kaj servis al li kiel servisto, obeante lin. Li per preĝo, kaj la filozofo — per parolo — ili kune venkis la hebreojn kaj hontigis ilin.

Okazis en tiuj tagoj, ke la slava princo Rostislav kaj Svetopolk sendis el Moravio sendi-

tojn al caro Mihail, dirante tiel: „ . . . Ni, slavo, estas malklera popolo kaj ni ne havas iun, kiu instruu nin kaj direktu nin al la vero.“ Tiam caro Mihail diris al Konstantino: „Ho Filozofo, ĉu vi aŭdis tiujn vortojn? Krom vi neniu alia povas fari tion. . . Iru, kaj prenu kun vi vian fraton, la monaĥejstron Metodion. Vi estas el Saloniko, kaj ĉiuj loĝantoj de Saloniko flue parolas la slavan lingvon“.

Aŭdinte la moŝtan parolon, la Filozofo . . . kompilinte la alfabeton kaj verkinte la preĝojn por la slava diservo, forveturis al Moravio, kunprenante Metodion.

Post kiam pasis tri jaroj, preparinte disĉiplojn, ili revenis el Moravio. Eksciinte pri tiuj viroj, papo Nikolaj sendis por ili, ĉar li deziris vidi ilin. . . Li konsekris ilian instruon, lokante la slavan evangelion en la altaron de la templo „S. Petro“, kaj la beatan Metodion li konsekris kiel diservanton.

Sed estis multaj aliaj homoj, kiuj insultis la slavajn librojn, dirante: „Laŭ la surskribo, kiun Pilato skribis sur la dian krucon, krom al la hebreoj, grekoj kaj latinoj, al neniu alia popolo decas havi siajn literojn“.

Post multaj tagoj, antaŭ ol aperi antaŭ la dia juĝo, la Filozofo diris al sia frato Metodio: „He, frato, ni estis jungitaj kune plugi nian sulkon. Finante mian vivon, mi falas en la kampon. Vi tre ŝatas la monton Olimpon, sed pro ĝi vi ne forlasu vian instruon, ĉar per ĝi vi pli facile povos savi vin.“

Sendinte senditojn al papo Adrian II, Kocel petis, ke li sendu al li Metodion, nian sanktan instruanton. Kaj la papo diris: „Mi sendas lin kiel instruanton ne nur al vi, sed al ĉiuj slavaj regionoj.“

Kocel akceptis Metodion kun granda honoro. Kaj denove sendis lin al la papo kune kun dudek viroj, estimindaj homoj, por ke li konsekru lin kiel episkopon de Panonio. . .

Sed post tio la ĉiama malamiko, envianto de la bono kaj kontraŭulo de la vero, ribeligis kontraŭ Metodion la koron de la malamiko de la moravia princo, kune kun ĉiuj liaj episkopoj. „En nia regiono vi instruas“ — diris al li ili. Kaj li respondis: „Se mi scius, ke ĝi estas via, mi forirus, sed ĝi apartenas al sankta Petro.“ Kaj ili diris al li: „Ĉar vi malobeeme parolas, vi ĝuos suferojn!“ Kaj li respondis: „Mi diras la veron antaŭ caroj kaj mi ne hontas, kaj vi faru kun mi laŭ via volo! Mi ne estas pli bona ol tiuj, kiuj — ĉar ili parolis la veron, liberegis de sia vivo per multaj suferoj.“

Poste, forlasinte ĉiun bruon... en daŭro de ses monatoj — komencinte en marto, kaj ĝis la dudek sesa tago de oktobro — Metodio rapide tradukis el la greka en la slavan lingvon ĉiujn librojn...

En la tago de Palmofesto, kiam kunvenis ĉiuj homoj, li iris en la preĝejon. Senfortiĝinte... li diris: „Infanoj miaj, gardu min ĝis la tria tago!“ Kaj tiel okazis. Kiam mateniĝis la trian tagon, li diris: „Dio, mi fordonas mian animon en viajn manojn!“ Li forpasis en la sesa tago

de aprilo, en 6393 (885) jaro post la kreo de la mondo.

Kiam oni metis lin en la ĉerkon kaj inde honoris lin per diservo en latina, greka kaj slava lingvoj, oni metis lin en la katedralon... Kiam kunvenis sennombra popolo, oni akompanis lin per kandeloj, plorante pri la bona instruanto: viroj, virinoj, junaj kaj maljunaj, riĉaj kaj malriĉaj, sinjoroj kaj servistoj, vidvinoj kaj orfoj, alilandanoj kaj indiĝenoj, sanaj kaj malsanaj — ĉiuj akompanis tiun, kiu estis ĉio por ĉiuj, por savi ĉiujn.

Esperantigis: Lidia RAEVA

Lingvaj problemoj

Pri la prefikso, prepozicio kaj akuzativo

PIV rekomendas: „Malkonsilinde estas uzi akuzativon anstataŭ prepozicio, kiusignifas deiron, formovon kaj tiel kontraŭdiras la direktan signifon. Oni diru—eliri el urbo, kaj ne—eliri urbon.“

Tiu ĉi rekomendo, tamen, ne estas sekvata. Ĉu oni devassekvi aŭ malsekvi la rekomendon?

La respondo postulas klarigon pri du fenomenoj.

La unua povas esti nomita: prepozicia funkcio de la prefikso.

Ofte la prefikso, efektive, ne funkcias kiel prefikso. Fakte ĝi funkcias kiel prepozicio. Ekzemple: subskribi leteron, surskribi koverton, preparoli aferon, kontraŭstari koncepton, transnaĝi riveron, transveturi oceanon, surtreti la scenejon, eniri la ĉambron, alfronti problemon ktp. En ĉi tiuj okazoj la prefikso, fakte estas kaŝita prepozicio. Anstataŭ diri: skribi sub la letero, sur la koverto, paroli pri la afero, stari kontraŭ la koncepto, naĝi trans la rivero(n), veturi trans la oceano(n), treti sur la scenejo(n), iri en la ĉambron, fronti al la problemo, oni transformas la prepozicion en prefikson kaj uzas la ĉi-supre menciitajn formojn. La signifo tamen restas la sama. Sanĝiĝas la stilo. Sanĝiĝas tamen ne nur la stilo. Sanĝiĝas ankaŭ la sintakso. Kiel vidite, la netransitivaj verboj — stari, naĝi, veturi, treti, iri, fronti — fariĝas transitivaj. La netransitiva funkcio de skribi kaj paroli — skribi sub, skribi sur, paroli pri—transformiĝas en transitivan. Do, oni povas formuli la principon: la transformo de la prepozicio en prefikson transformas la netransitivan verbon en transitivan.

Kaj nun sekvas la demando: ĉu tiu ĉi principo ne validas pri la deiraj kaj formovaj prepozicioj?

La respondo al tiu ĉi demando jam postulas klarigon pri la alia el la menciitaj en la komenco du fenomenoj. Temas pri la fenomeno akuzativo.

La akuzativo havas tri funkciojn. La unua, la plej tipa, estas la funkcio signi la rektan

objekton de la transitivaj verboj. La dua funkcio estas: „montri la direkton, la almovon“ (PIV). La tria: „anstataŭi prepozicion antaŭ la tempaj, daŭraj kaj manieraj adjektoj“ (PIV).

Tutklaras, ke la deiraj kaj formovaj prepozicioj ne povas kombiniĝi kun la dua funkcio de la akuzativo. Oni ne povas diri: iri el la urbon, iri el la ĉambron. Tutklaras ankaŭ, ke eĉ en kostumo de prefikso tiuj ĉi prepozicioj ne povas esti kombinitaj kun la dua funkcio de la akuzativo. Do, la akuzativo en la esprimo **eliri la urbon** estas neeble, sed **nur**, se oni traktas la akuzativon en la dua funkcio. Sed pro kio la akuzativo ne eblas en la unua funkcio? Do, en la funkcio de rekta objekto? Pro kio ĉiuj aliaj prepozicioj kapablas per prefiksigo transformi la netransitivecon en transitivecon, sed nur la deiraj kaj formovaj prepozicioj ne povas fari tion? Konvinkaj argumentoj por malagnoski al tiuj ĉi prepozicioj la kapablon transformi la netransitivecon en transitivecon ne ekzistas. Kontraŭe. La agnosko helpas krei simetrian sistemon, kio harmonios kun la postuloj de lingvo, kies plej karakteriza trajto estas la logikeco.

Oni ne devas forgesi la ĉiaman helpemon de la kunteksto — tiu grava helpanto de la signifo, fakte la vera kreanto de la signifo.

Tamen, se pro la specifo de la okazo estas necesa pli granda precizigo de la esprimo, ekzistas plia rezerva varianto. Tio estas la uzo, krom de la kaŝita, ankaŭ de la malkaŝita formo de la prepozicio.

La uzo, tamen, de la prepozicio en ĝia malkaŝita formo ĉesigas la efikon de la kaŝita formo kaj restarigas la originajn „rajtojn“ de la prepozicio. Pro tio **eliri la urbon** fariĝos **eliri el la urbo**.

Kiel vidite, la solida logika bazo, sur kiu estas konstruita Esperanto, disponigas grandajn eblojn por precizigo kaj fajnigo de la esprimo.

LJUBOMIR MIHAJLOV

STEFAN ĈIRPANLIEV

HEĜO

STEFAN ĈIRPANLIEV —sekretario de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj—filio en Jambol, estas naskita en 1936 en urbo Jambol. Malgraŭ ke el plej junaj jaroj li faris impreson per sia literatura talento, li finis konstru-inĝenieran fakultaton. Post kelkara laboro kiel inĝeniero, li disiĝis kun la konstruado, studis kaj sukcese finis bulgaran filologion. Nun li laboras en la Distrikta Komitato de Kulturo, samtempe estas aspiranto en la Instituto de Literaturo ĉe Bulgara Akademio de Sciencoj.

Li verkis la librojn: „Post la pluvo“, „La ribelulo el Medven“ — dokumenta novelo pri Zahari Stojanov, „La elpensita insulo“, „Glorado de vilaĝo Medven“. Li verkis same multajn rakontojn, tradukis el la rusa, germana, pola, araba k. a. lingvoj. Kiel lernanto li lernis iomete Esperanton. Ni estas tre ĝojaj, ke nun li denove alvenis en niajn vicojn.

Al la homoj ĉirkaŭ la nivelilo alproksimiĝis larĝsultra vilaĝano kaj etendis sian maldikan fortan kolon. Liaj viglaj okuloj rapide ekmoviĝis super la brilantaj ŝraŭboj de la instrumento, poste speguliĝis en la mortaj okuloj de la nivelilo kaj, se la teknikistoj ne estis absorbiĝintaj en la desegnaĵo, li certe ekdemandus:

— Por kio servas tiu ĉi ŝraŭbeto? Kaj tiu ĉi? Ĉu vere, ke tra tiu ĉi binoklo homoj vidiĝas kun la kapo malsupren?

La teknikistoj ekmoviĝis. La pli juna, malalta blondulo, kaptis la nivelilon kaj rapide ekmarŝis tra la kota vilaĝa strato, sulkigita de mallarĝaj vojetoj.

La pli aĝa elpoŝigis avare akrigitan krajoneton, surmetis okulvitrojn kun nenature dikaj framoj kaj lia vizajo neatendite malgrandiĝis. Apenaŭ nun li rimarkis la vilaĝanon, kiu kulpokonscie ridetis kaj kaŝis siajn grandajn manojn post la dorson.

— Vi, kamarado, hodiaŭ ŝajne estas senlabora?

La vilaĝano timtremis pro la neatenditaj vortoj de la teknikisto kaj retiriĝis malantaŭen.

— Ho, mi ne restas senokupa. Mian filon mi atendas. Li estas soldato en Stranĝa-montaro. Li skribis al mi, ke li ricevis dutagan forpermeson por vidi sian fileton, kiu antaŭ nelonge naskiĝis. Se li ne alvenos per la aŭtobuso, eble per ŝargaŭto aŭ per motorciklo li povos. . . Mi perdis pro tio du salajrojn, sed pro la filo. . .

— Do, tiel — diris la pli aĝa teknikisto kaj metis la okulvitrojn al la frunto.

— Aŭskultu, ĉu vi deziras gajni bonan tag-salajron dum vi atendas vian filon? Ni havas urĝan laboron!

La vilaĝano gratetis sin post la orelo.

— Ne timu, la laboro estas simpla. Vi portos la stangon kien ni diros al vi. Kaj kiam la vilaĝestro sendos al ni helpanton, vi estos libera. La vilaĝano ne tuj respondis — li verŝajne kalkulis kiom da mono li povus gajni de tiu neordinara laboro. Poste li piedpuŝis terbulon, sur kiu elstaris grandaj pajleroj. Li sulkigis la fronton kaj diris:

— Ĝis kiam venos la filo, mi povas labori. Donu la stangon! Ĝi certe ne estas peza.

La maljuna teknikisto ekspiris libere. Ili sukcesos fini la laboron kaj hodiaŭ vespere povos reveni en la urbon per la ĵipo.

— Multaj kiel vi venadis en nian vilaĝon, — ekbabilis la vilaĝano. Ili tajlis la vojon, rigardis tra la binokloj, enŝoviĝis en la kortojn. . . Kaj fine ĉio restis kiel ĝi estis.

La juna teknikisto gajigis:

— Nun ne estos tiel, onklo, baldaŭ vi marŝos sur asfalto.

— Nu, ni vidos, ni vidos!

La maljuna teknikisto salivumis la krajonon super la desegnaĵo. La pli juna okulstreĉis tra la okulario de la nivelilo kaj la vilaĝano staris kiel soldato sur posteno malantaŭ la stango kaj abunda ŝvito fluus inter la malmolaj haroj de lia nerazita vizajo.

La vilaĝano jam multfoje ŝanĝis sian lokon, enŝoviĝis en plektobarilojn, kaŝis apud la novaj domoj.

Fine ili alvenis ĉe la fontoŝtono.

— He, kamaradoj, la fontoŝtono ne malhelpos al la nova vojo, ĉu ne?

— Ni translokos ĝin onklo, ĉar ĝi estas sur la akso de la nova vojo.

Al la vilaĝano ne estis klare, kion signifas „la akso de la vojo“. En lia konscio aperis la vorto „osten“*. Li jam ne sciis kion pensi.

— Ĉu ni ne povus ĉirkaŭi ĝin? Ĝi estas malnova fontoŝtono, ni memoras ĝin de nememorable tempo. Ĝi estis la sola ornamo de nia vilaĝo antaŭ la Naŭa de Septembro.

— Ni konstruos al vi pli belan kaj vi forgesos ĝin — diris la pli juna teknikisto.

La vilaĝano karesis la verdetan muskon sur la ŝtonplatoj, kovrantaj la malnovan fontoŝtonon. „Ho, tiuj homoj detruos“ ĝin, neniu malhelpos ilin!“

La vilaĝano jam komprenis — kiam li ekstaros kun la stango — antaŭ li etendos sin la brile nigra vojo. Kaj ĉio, kio estas sur la vojo, estos detruita! La okulario de la nivelilobrilis malbonsigne, kiel la okulo de fantasta maŝino, kiu faligas ĉion sur sia vojo.

Ili atingis la heĝon. Ĝi eksusuris en liaj oreloj. La bruo estis ĝis doloro konata — mola kaj karesema. Lia heĝo! Ĉu ili scias, tiuj ĉi homoj en bluaj kotonjakoj, kiel oni plantas heĝon? Ĉu ili scias dum kiom da noktoj li ne dormis,

por gardi la plantidojn de la brutaro kaj de la infanoj, kiuj faris el ili frapilojn?

Antaŭ li ekbrilis la mokema okulo de la nivelilo.

La vilaĝano jetis la stangon. Poste li ekiris per pezaj paŝoj al tiu malbenita okulo. Li kvazaŭ irus tra la novalo.

La maljuna teknikisto palpebrumis rapide. La alia gratis per krajono sur la tabuleto. Super la instrumento ekbalanciĝis minaca ombro.

— Tiu ĉi barilo estas mia kaj mi ne permesos al vi tuŝi ĝin! — ekkriegis la kvietita vilaĝano. Mi ne volas vian asfaltvojon! Iru for kun viaj binokloj, ĉar mi tuj dispecigos ilin!

— He, kamarado, ĉu vi frenezigiĝis? — ekkriis la juna teknikisto.

El la pordegoj de la najbaraj kortoj kaŝe elrigardis infanoj.

— Nian vilaĝon ili detruos, he, homoj! La heĝon ili elradikos — kriis la vilaĝano kaj ŝvingis la stangon, kvazaŭ ĝi estus malpeza kiel plumo.

— Kial vi kriaĉas? — riproĉe aŭdigis sin juna virino kun kuspitaj blankaj manikoj. Kiam revenos via soldato, li faros barilon el brikoj, li ne volos stumbli sur via fava heĝo!

La vortoj de la virino kvazaŭ rompus la

manojn de la vilaĝano. Li ĝibigis kiel mallaŭdita hundo kaj ekmarŝis malsupren, al la spaco ĉiam ankoraŭ nekonkerita de la okulo de la nivelilo.

Vespere li ne revenis hejmen. Lia maljuna edzino kaj la bofilino ekploregis same kiel por mortinto. En kokokria tempo la soldato-libertempulo ekfrapis sur la pordon. Li estis alveninta piede.

Ĉiuj sin jetis por serĉi la maljunulon. Eble li dronis en la forlasita puto apud la vunberkampoj. Flanke de la legomĝardeno ekbojis la maljunega surda Guĝo. La hundo ekbojis malĝoje kaj tirvoĉe. En la matenkrepusko la soldato marŝis tra la ĝardeno. La maldikaj ŝosoĝoj de la heĝo pikis lin, tiklis lin je la kolo kaj la oreloj. Guĝo sidis apud malhela amaseto, kiu apenaŭ moviĝetis.

— Paĉjo, he, paĉjo — ekkriis la soldato.

Aŭdigis detenata ĝemado. La vilaĝano kuŝis apud la heĝo kvazaŭ li estus kunkreskinta kun ĝi.

Tradukis: Bojan Kuŝev
Jordanka Popova

*Vortludo: osten — bulgara vorto, kiu signifas pikbastonon; akso — bulgarlingve — oc — Not. de la Red.

AL LA PACBATALANTOJ

La ŝton' malvarma ja ne estas viva —
ĝi nur ekzistas,
ne pensas kaj ne estas ĝi sensiva,
ĝi ne rezistas.

Ne sentas ĝi malĝojon, nek doloron
kaj ne suferas,
ĝi dormas ĉiam kaj ne havas koron,
ne malesperas.

Sed estas ja alia spec' de homoj-ŝtonoj —
militaristoj, pli malicaj ol demonoj.

Ilia ŝtona cerbo kvazaŭ ne funkcias —
la vivdangero ili tute ne konscias
kaj ili havas karakteron de ŝakaloj,
iliaj planoj estas planoj de vandaloj.

Preparas ili la pereon de l'homaro
per armilar' diversa plej barbara.

Sed ni ne malesperu, fratoj, kaj sen laco
batalu brave por la savo de la paco!

Ni venkos — estas ni potenca kolektivo
kaj defendantoj plej fidelaj de la vivo.

Kun ni ja estas la justeco kaj la Vero
kaj la plimulto de l'homar' de l'tuta Tero.

Triumfos baldaŭ nia nobla idealo —
sur la planedo venkos nia pacbatalo!

1985

SIMANANDA

AMU MIN!

Mi pentras vin kiel floron,
ĉar la floro estas

la plej bela,

kion la vivo donacas al ni —
en feliĉo aŭ ĉe disiĝo. . .

Mi tuŝetas vin per mia animo,
por ke vi povu malkaŝi min,
kaj ni estiĝos nova komenco. . .
Mi benas vin per mia koro,
pro la ĝojo kaj doloro,
kiuj plenigos nian vivon.
Amu min, ĉar la vivo estas amo! . . .

Penka PAPAZOVA

NOKTO

Silento!
La nokto ploras
en mia kor'. . .
Kiu frapas
sur la fenestro,
kiu venos
en tiu malfrua hor'?
Ĉu vento
aŭ ies paŝoj? . . .
Ho, nokto, vi naskas
doloron kaj esperon!
Ne ploru,
malkovru al mi
la sekreton
de homa kor'. . .
Mi silentas
kaj kolektas
la larmojn
de via am'. . .

Penka PAPAZOVA

JAPANIO — MALPROKSIMA KAJ PROKSIMA

(Daŭrigo de n-ro 4/85)

Jen mi estas en Nara, la unua ĉefurbo de Japanio (709—784), urbo konservinta ĝis nun sian antikvan ĉarmon. Malaltaj belaj domoj, verdaj kaj bele ordigitaj ĝardenoj. Parko kun multe da temploj, verdaĵo kaj cervoj. Malsovaĝaj cervoj, kiuj trapasas trankvile la aleojn kaj miksiĝas kun la homa amaso. Cervoj sin nutrantaj el la homaj manoj. Ni vizitas la muzeon de Nara, kolektintan antikvajn originalajn objektojn, multaj el kiuj estas proklamitaj naciaj trezoraĵoj. Aparte interesa eksponaĵo estas la virino kun tri vizaĝoj kaj tri paroj da manoj.

Antaŭ la esperantistaro el urbo Takacki mi rakontas pri la Kursejo kaj pri „Dektri-jarcenta Bulgario. Fine mi projekcias lumbildojn. Ankaŭ ĉi tie demandoj, ankaŭ ĉi tie vigla intereso al malgranda Bulgario.



Vasja Cvetkova inter japanaj geesperantistoj

Sinjoro Takeuĉi estas tre entuziasma esperantisto. Dank' al lia senlaca agado, en la urbo ekzistas forte evoluinta Esperanto-movado kaj la lokaj aŭtoritatoj havas pozitivan rilaton al Esperanto. Jen pro kio min akceptas tre afable kaj amike por mallonga konversacio la ĉefsekretario de la urbestro sinjoro Ken Mori. Mi estas ravita de lia pozitiva rilato al la evoluo de la Internacia Lingvo, de lia subteno al la popularigo de Esperanto kiel lingvo de la amikeco, interkompreniĝo kaj paco.

Poste mi renkontiĝas kun esperantistinoj. La prelego „Laborantaj bulgarioj“ vekas ankaŭ ĉi-tie grandan intereson.

Sinjinoro kaj sinjoro Takeuĉi akompanas min al Kioto, la urbo pri kiu mi aŭdis tiom interesajn rakontojn kaj kiun mi ege deziris vidi. Ĉe la Kiota stacidomo al ni aliĝas grupo da esperantistoj el la urbo, inter kiuj ankaŭ sinjoro

Fuĝimoto kaj lia edzino, vizitinta Bulgarian kaj skribinta libron pri ĝi. Ni vizitas la templon de mil Budaoj. Ni eniras enen sen ŝuoj. En longforma ejo feste kaj mute staras mil oraj Budaoj, ordigitaj amfiteatre en kelkaj longaj vicoj. Ĉiu el la statuoj posedas kvardek manojn, kaj ĉiu mano havas sian pozon kaj tenas ion diversan de la aliaj. Tiu vidaĵo estas tiom neordinara por mi, ke mi simple falas en ekstazon. Sinjinoro Takeuĉi flustras al mi, ke neniu el la Budaoj plene similas al la ceteraj. Ĉiam ekzistas ia eta diferenco. Mi okulstreĉas. Por mi estas malfacile konstati tion, ili tiom similas unu la alian.

Kioto estas sankta urbo por la japanoj, konservinta eĉ hodiaŭ siajn malnovajn popoltradiciojn. Urbo-muzeo, kiu revenigas la vizitantojn en pasintajn epokojn kaj montras al ili la vivmanieron, kulturon kaj historion de unu antikva popolo. Pli ol dek jarcentojn Kioto estis floranta ĉefurbo de Japanio (794—1868). Situanta en bela valo, ĉirkaŭita de pitoreskaj montoj, ĝi estis alloga centro por la adeptoj de ambaŭ ĉefreligioj — budaismo kaj sinto. Ne vane ĉi tie konkuradis grandaj majstroj — kreintoj de temploj, palacoj, monaĥejoj. Oni diras, ke en Heian kio (la unua nomo de Kioto, kiu signifas ĉefurbon de paco) estas pli ol 1500 temploj de Budao kaj pli ol ducent sinto-sanktejoj.

En Kioto mia ĉiĉerono estas sinjoro Fuĝimoto. Reganta perfekte Esperanton, li kondukas min al kelkaj el la multaj famaj rimarkindaĵoj de la urbo: la palaco „Niĝo“ de la lasta ŝoguno¹ el la familio Tokugava, konstruita en XVI jc — unuetaĝa ligna konstruaĵo, impresanta per la simpleco de la arkitekturaj formoj, Heian Srain — sinto-sanktejo kun belega ĝardeno, kaj la malnova budaisma templo „Kiĝomizu“, konstruita apud monta deklivo inter multjaraj belaj arboj.

Laŭ mia peto sinjoro Fuĝimoto kondukas min tra la kvartalo de la geĵoj. Geĵso en traduko signifas „Homo de la arto“. Virinoj ne havas enirrajton en la domoj de geĵoj. Tio estas rajto nur de viroj. La geĵoj estas ĉiufanke edukitaj, kun riĉa kulturo kaj grandaj artismaj talentoj. Oni edukas la geĵojn, por ke ili liveru al viroj momentojn de feliĉo, sinforĝeso, ravo kaj ĝuo. Sed ĉu la geĵoj mem travivas la samon? Kompreneble, mi ne povas enrigardi en tiujn domojn kaj mi ricevas nur iomajn informojn pri ili kaj pri ties vivmaniero.

Sed la fabela promenado finiĝas kaj sinjoro Fuĝimoto akompanas min al la stacidomo. Ĉi tie mi trovas familion Takeuĉi, venintan speciale por adiaŭi min.

Sinjoro Takeuĉi faras al mi la laŭvican agablan japanan surprizon. Li envagoniĝas kaj akompanas min al urbo Gifu.

Ce la stacidomo en Gifu nin renkontas la esperantistoj sinjoroj Senga kaj Tojota. Ili ardas pro senpacienco konduki nin al la ĉ-vespera fiŝkaptista festo, tipa por urbo Gifu.

.....

La superekspresa vagonaro veturigas nin al la granda japana urbo Nagoja. Antaŭ la laŭvica Esperanto-kunveno mi havas la eblecon viziti la televidan turon kune kun miaj ĝentilaj amikoj el Gifu. De tie la urbo vidigas kiel sur manplato.

La nagojaj esperantistoj renkontas min kore kaj gastame. La kunveno, sekvata de lunĉo, kreas amikecan atmosferon kaj plialtigas la intereson al Bulgario, al la bulgara Esperantomovado.

Poste ni ĉiuj vizitas la muzeon de ŝoguno Tokugava kaj posttagmeze kun sinjoro Suzuki ni faras aŭtomobilan promenadon tra bela kaj moderna Nagoja.

Vespere okazas eksterprograma kunveno kun esperanta kaj neesperanta publiko. Temoj: „Laborantaj bulgarinoj“ kaj „Dektri-jarcenta jubileo de Bulgario“. Tradukanto estas la bonega esperantisto sinjoro Morita, prezidanto de la Esperanto-societo en Nagoja. Post la prelego venas demando post demando. La scivolemaj japanoj interesiĝas pri multaj aferoj en nia lando.

Kaj denove survoje — per ekspresa vagonaro al urbo Misima. Post kelkhora vojaĝo mi alvenas al la stacidomo, kie min atendas la bona kaj kara sinjoro Kurita. Per aŭtomobilo ni tuj ekveturas al monto Fugi, la plej alta en Japanio. La vojo serpentumas supren inter kampoj kaj belaj cedraj kaj juniperaj arbaroj. Ni atingas alton de du mil kvarcent metroj. Antaŭ ni aperas belega vido. Alte en la ĉielaj vastaĵoj levas konusforme potenca staturon la fama legenda pinto Fugijama, alta 3776 metrojn (samtempe ĝi estas vulkano). La diametro de la vulkano estas sescent metroj. Ĝi erupciis en 1649, 1707, 1708) Laŭ la japanaj informfontoj en la lando ekzistas proksimume 58 vulkanoj, aktivaj en diversaj periodoj. Dek monatojn en la jaro pinto Fugijama estas kovrita per neĝo. De la stacio, kien ni alvenis, ekiras supren al la alloga pinto malmulte da homoj — nur la plej kuraĝaj turistoj, ĉar la vojo estas longa kaj malfacila, kovrita per malvarmiĝinta ruĝebruna lafo.

Sur la returna vojo sinjoro Kurita montras al mi la lokitan apud la ŝoseo grandan usonan armebazon por malproksima interkomunikado. Nun en Japanio estas multaj usonaj armeaj bazoj, kontraŭ kies ekzistado energie protestas la tuta pacama loĝantaro.

.....

Mia mirinda vojaĝo tra la lando de Leviĝanta Suno² proksimiĝas al sia fino. La lastaj du ta-

goj estas denove destinitaj al Tokio.

Bedaŭrinde, tute ne eblas por eksterlandano nur en kelkaj tagoj vidi la rimarkindaĵojn de la plej granda en la mondo urbo.

La lastan tagon en Tokio mi vizitas kun sinjoro Kurita la bulgaran ambasadejon. Tre gastame kaj ĝentile nin akceptas la kultura konsilanto kamarado Ognjan Mitev. Li alte pritakas mian agadon en Japanio kaj persone dankas al mi. Li dankas kore ankaŭ al sinjoro Kurita pro la bonega organizado fare de la esperantistoj en ĉiuj japanaj urboj, kie mi prelegis.

Posttagmeze la 22-an de aŭgusto mi forlasas Tokion, akompanite de sinjoro Kurita kaj sinjorino Vasio. Vespere ni atingas Jokohamon. La agrabla promenado tra la interesa kaj bunta ĉina kvartalo kaj amika vespermangxo en eta komforta restoracio vigligas nian bonhumoron post la longa veturado.

Kaj jen la tago de la disiĝo alvenas. La 23-an de aŭgusto matene ĉe la haveno jam estas venintaj sinjorino Doi kaj s-ro Kurita. La dankvortoj, kiujn mi deziras direkti al ili, al ĉiuj, kiuj sindone zorgis pri mi dum mia restado en Japanio, ne vicigas tiel kiel mi volus.

Post la kutimaj limaj formalaj ŝipo „Hararovsk“ akceptas ĉiujn vojaĝantojn. Mi fariĝas atestanto de bela japana kutimo ĉe disiĝo. Kaj la adiaŭantoj, kaj la pasaĝeroj el la ŝipo jetas inter si diverskolorajn falditajn paperubandojn, kiuj ĉe sia flugo malvolviĝas. La bildo estas nepriskribebla laŭ sia beleco kaj ideo. Kvazaŭ la adiaŭantoj kaj la forveturantoj estas ligitaj por ĉiam kaj ne deziras disiĝi, kvazaŭ ĉiu disdonas ereton de sia amo kaj estimo al la alia.

La ŝipo malrapide malproksimiĝas de la haveno. Unu post alia la buntaj rubandoj, kreintaj por momento tiom da ĝuo por la okuloj, falas en la maran akvon. Mi por lasta fojo mansvingas al sinjoro Kurita kaj sinjorino Doi por lasta fojo mansvingas ankaŭ ili al mi.

Ĝis revido, Japanio! Lando de Leviĝanta Suno, de beleco, de gastama, bonkora kaj laboremaj popolo! Ĝis revido, ĝis novaj renkontiĝoj, miaj karaj neforgeseblaj geamikoj-esperantistoj! Sajnas al mi, ke neniam mi povos rekompenci vin pro viaj sindonaj zorgoj, akompanantaj min ĉiupaŝe. Ankoraŭfoje akceptu mian grandegan kaj tutkoran dankon.

VASJA CVETKOVA
(Fino)

FALDFOLIO „KIO ESTAS USSR?“

Sub tiu ĉi titolo la eldonejo de Presagentejo „Novosti“ aperigis fine de la pasinta jaro altkvalitan koloran faldfolion. Presita sur glacea papero, riĉe ilustrita, la faldfolio en bona Esperanto populare informas la legantojn pri la soveta socia sistemo; pri vivnivelo de la loĝantaro; pri konstruado en la lando; pri la rajto de ĉiu soveta civitano studi kaj labori; pri la batalo de la soveta popolo por paco sur la tero kaj pri la agado de la sovetaĵ esperantistoj.

¹Ŝoguno — altranga militestro

²Lando de la Leviĝanta Suno — Japanio

AKADEMIANO SERGEJ BOEV

80-JARAĜA

Kara malnova amiko Boev,

Jam pasis kelkaj jardekoj de post kiam ni komencis korespondadi: tio okazis en la jaroj 1926-1927. Vi tiam estis studento de veterinara medicino en u. Saratov, Sovetunio, mi — lernantino en la gimnazio de u. Sliven, Bulgario.

Mi sufiĉe bone posedis Esperanton kaj publikigis mian adreson en „Sennaciulo“, organo de SAT. Multajn proponojn pri korespondado mi ricevis el diversaj landoj.

La plej bonaj, enhavoriĉaj kaj perfekte skribitaj estis viaj leteroj, kamarado Boev. Antaŭ mi kuŝas viaj leteroj de la jaroj 1926, 1927 kaj 1928. Ili delonge flaviĝis, sed estas karegaj al mia koro, kvazaŭ ĵus ricevita. Vi skribis longajn leterojn kaj rakontis kiel vivas, lernas kaj laboras la junularo en via socialisma patrolando.

Tiu tempo jam apartenas al la historio.

Ĉiujn ricevitaĵojn de vi kaj de aliaj sovetaĵoj esperantistoj leterojn mi legis en bulgarlingva traduko antaŭ laboristoj en sekretaj komsomolaj kaj partiaj kunvenoj.

La jaroj pasis. Oni ofte arestis min pro partopreno en la laborista liberiga movado. Viaj leteroj donis al mi kuraĝon firme kredi, ke venos tempo, kiam ankaŭ ni bulgaroj ekvivos kiel niaj liberaj sovetaĵoj amikoj.

La 9-an de septembro 1944 Bulgario libe-

riĝis per armita popola ribelo kun la decida helpo de la Soveta Armeo. Ni komencis organizi nian novan vivon laŭ la ekzemplo de la sovetaĵoj kamaradoj. La esperantistoj ankaŭ donis sian kontribuon en la konstruado de la nova vivo.

Ofte mi pensis: ĉu restis vivaj almenaŭ parto el miaj sovetaĵoj korespondantoj?

La unua letero venis el Leningrado de amiko Paulo Sumilev. Ĝi longe vagadis ĝis kiam trafis miajn manojn. Baldaŭ venis letero de k-do Konstantin Gusev. Li skribis: „Tinka ĝoju! Via malnova amiko Sergej Boev estas viva! Li jam estas profesoro, akademiano en Alma Atal!“

Grandega estis mia ĝojo, kara amiko Boev! Rekomencigis nia malnova korespondado kun vi, ĉiam korekta korespondanto. Kaj mi, mia edzo Atanas Lakov, miaj malnovaj kamaradoj-esperantistoj Nikola Aleksiev, Ĥristo Gorov, k. a. povis vidi vin en nia lando, kiel gasto de nia Sciencakademio. Tiuj tagoj estas neforgeseblaj. Vi, kara amiko, restis por ĉiam amiko de nia popolo, amiko de nia esperantistaro.

Okaze de via 80-jariĝo mi gratulas vin en mia nomo kaj en la nomo de ĉiuj bulgaraj esperantistoj. Al vi ni deziras sanon, feliĉon kaj longan vivon en paca mondo!

Sofio, 1985

Via: TINKA LAKOVA,
veteranino de BEA

REKVIEMO POR MIĤAIL ELENOV

La 13-an de marto ĉi-jare forpasis nia neforgesebla samideano kaj amiko — la senlaca, sinoferema, alte inspirita pioniro de la Esperanto-movado Miĥail Elenov. Sian tutan devokonscian vivon de verva mondlingvano kaj pacbatalanto li pasigis en intensa laboro por stabiligo kaj disvastigo de la Zamenhofa lingvo kaj de la Zamenhofaj ideoj.

Miĥail Elenov naskiĝis la 22-an de marto 1912 en Lozengrad (Egea Trakio). Li finis siajn gimnaziajn studojn en Burgas kaj en 1938 — siajn altajn studojn en la Stata Libera Universitato de Sofio, kie li specialiĝis pri administrado kaj financaj problemoj. Poste li studis ĵurajn sciencojn en la Stata Libera Universitato kaj laboris kiel ĉefkontisto kaj eksperto-kontisto. Post sia emeritiĝo li oficis kiel lektoro pri specialaj ekonomikaj disciplinoj en la teknika lernejo en Ĥaskovo.

Esperanton li lernis dum sia juna aĝo, kiel disĉiplo de Atanas D. Atanasov — ADA, dank' al kiu la internacia lingvo kaj la problemoj de la esperantologio kaj de la interlingvistiko fariĝis lia ĉefa hobbio. Li ne nur perfekte posedis Esperanton, sed estis unu el la plej elstaraj bul-

garaj instruantoj de tiu lingvo. Kiel lingva pedagogo kaj metodikisto li ellaboris sian propran manieron de instruado, sian originalan metodon.

En Ĥaskovo, tuj post la inaŭguro de la filio de la Sofia Universitato, Miĥail Elenov estis ofice nomita lektoro de Esperanto en tiu filio. Kaj ĝis la likvido de la filio li funkciis kiel ĝia honorariata lektoro.

En 1979 li fondis la unuan en la mondo Infanan Esperanto-Teatron. Krome, dum sia restado (kiel oficisto) en Burgas, li kreas la esperantistan teatron studion ĉe la distrikta teatro „Adriana Budevskaja“.

Fondinto de la Instrua Centro ĉe la Sofia Urba Estraro de BEA kaj laborante kiel metodikisto ĉe la Sofia Distrikta Estraro de BEA, li transdonis sian pedagogian sperton al la nova generacio de lektoroj de Esperanto.

Dum sia preskaŭ duonjarcenta instruado de la Internacia Lingvo Miĥail Elenov akumulis grandiozan pedagogian sperton kaj famiĝis kiel unu el la plej elstaraj metodikistoj de la lingva pedagogio.

Stojan GUGEVO

NIA VERDA TABULO

La Novjaro 1985 startis kun ĝojigaj kaj esperigaj sukcesoj. Konsiderinde plialtigis la intereso de la geesperantistoj al nia revuo. La nombro de niaj legantoj, kiuj abonis „Bulgara Esperantisto“ per REP (ŝtata entrepreno por disvastigo de la gazetaro) pliiĝis per 385. Krom tio, en la kancelario de CE de BEA ĉiutage venas listoj de novaj abonantoj de „BE“, ŝatata legaĵo de la bulgara kaj eksterlanda esperantistaro.

Ĝojiga estas la fakto, ke nia legantaro plijuniĝas. Aplaudinda estas la fervora bonrezulta laboro de Ŝumenanoj, varbintaj en 4 lernejoj 97 ĝelernantojn. Ni elkore gratulas ilin!

Vere modelaj varbantoj de nia Asocia organo manifestiĝis niaj samideanoj el la distrikto de Jambol.

Ili superis per 221% la planitan kvanton de 70 abonoj kaj per 258% — la efektivigitan pasintjaran varbokvanton. Bonegaj estas la atingoj en la distriktoj de Razgrad kaj Ŝumen, konkure luktantaj por okupo de la dua loko. La unua superis la kontrolciferon per 9%, la dua — per 11% kaj kompare kun la pasintjara rezulto ili havas respektive 162% kaj 224%. Tamen la montritaj procentoj povas erarigi nin, se ni ne scias, ke pasintjare Razgradanoj superis Ŝumenanojn per 39 abonantoj, kaj nun — per 26.

Laŭkvante la distriktoj viciĝas alimaniere: Veliko Târnovo — 312, ĉe plano 332 kaj pasintjara rezulto — 307; Stara Zagora — 281; Smoljan — 254; Plovdiv — 233. El inter ili nur la unua distrikto plialtigis la pasintjaran varbokvanton.

La Redakcio varme gratulas ĉiujn sindonajn senlacajn abonvarbantojn kaj bondeziras al ili bonan sanon kaj fruktodonan agadon.

LA JARKUNVENOJ

La ĉi-jaraj jarkunvenoj pasis emocie, la pli longaj kaj viglaj diskutoj ne estis hazardaj. Ja antaŭstaras la 41-a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio! La societaj membroj ne nur faris bilancon de sia laboro, en la tagordo de la societaj jarkunvenoj estis starigita la demando pri antaŭkongresa konkurado. La rezultoj estos anoncitaj en julio, kiam ni kongresos. Sed nun, dank' al la kontribuajoj de niaj fidelaj korespondantoj, ni proponas al niaj legantoj panoramon de la societa organiza kaj kultura vivo.

„BE“

BOTEVGRAD. Pri la agado de la urba E-societo „Trifon Hristovski“ raportis ĝia sekretario. St. Bojkova. Si parolis pri la partopreno de la societo en la pachatalo, pri la vigla korespondado kaj pri la rapida plikresko de la membroj: en 1980 ili estis nur 15 kaj en 1985 — proksimume 200. La sekretario rakontis al la ĉeestantoj pri la partopreno de la societanoj en landaj kaj eksterlandaj iniciatoj, pri la multaj premioj de diversaj festivaloj kaj pri sinprezento en E-tendaroj kaj brigadoj. Oni informis, ke la societo jam havas sian klubejon.

Kiel prezidanto de la societo estis reelektita Mitrofan Velev — ĉefredaktoro de ĵurnalo „Botevgradski Plamak“ (Botevgrad-a Flamo).

Ganka HĀĜIEVA

JAMBOL. La medicinistoj el E-societo „Sano“ okazigis sian jarkunvenon en la klubejo de la distrikta stomatologia polikliniko. Gastis k-do Lazov el la Komunuma Komitato de BKP kaj Dimo Trudoljubov — prezidanto de DE de BEA.

Sub la gvidado de d-ino Jordanka Popova medicinistoj el Jambol lernas la Internacian Lingvon. Ili havas kontraktojn kun la Internacia Medicina Asocio. La membroj de la societo korespondas kun kolegoj el USSR, GDR, Francio. Pasintjare la medicinistoj-esperantistoj partoprenis la laboron de la E-sekcio dum la Dua Internacia Konferenco de la Ekologoj „Svieko'84 en Svišov, partoprenis ankaŭ internacian E-turistan renkontigon en Slovaka Paradizo en la altaj Tatroj, iniciatojn de IEK en Pisanica, la Kvaran Nacian Konferencon de Medicinistoj-Esperantistoj, la Tagojn de Vapcarov-poezio en Bansko.

Iliana ILIEVA

● La kunvenon de la Agrarana E-societo „Aŭroro“ ĉeestis la sekretario de DE de BEA — Mariana Georgieva kaj la reprezentantino de la urba E-societo „Maksim Gorkij“ Maria Paskaleva.

Raporton pri la societa agado dum la pasinta jaro tra legis Penka Papazova — prezidantino de „Aŭroro“. Si substrekiis, ke kvankam la societo estas nova, ĝi donas sian kontribuon por variigo de la E-vivo en Jambol. Al la societo funkcias E-kurso por komencantoj. Ĝin partoprenas la duono el la membroj. Same tiom da societanoj abonis revuon „Bulgara Esperantisto“.

La kunveno akceptis laborplanon por 1985 kaj elektis novan societan estraron.

Penka PAPAZOVA

PAZARGIK. En sia raporto antaŭ la jarkunveno de E-societo „Radio“ la prezidanto d-ro Ivan Ĉunĉev substrekis, ke en ĝi membras 120 esperantistoj. Ili regule korespondas kun samideanoj el multaj landoj.

Estis akceptita laborplano kaj estis elektita nova societa estraro. La kunveno decidis denove elekti kiel sian prezidanton d-ron Ivan Ĉunĉev.

Konstantin GENĈEV

PLEVEN. En sia raporto la prezidantino de E-societo „Eterna Amikeco“ d-rino Emilia Kanjovska substrekis, ke amase estas organizitaj E-kursoj por lernantoj en la elementaj kaj mezaj lernejoj, konstante funkciantaj al la E-klubejo, ekstraj intensaj kursoj por instruistoj. La praktikado de la lingvo efektiviĝas per la ĉiumerkredaj kunvenoj de „Parolanta Rondo“.

La societanoj kreis grupon de amatora artagado kaj regule laŭokaze organizas festvesperojn kaj ekskursojn.

Antaŭ nelonge la societo celebris sian 80-jariĝon. Tiukaze estis distingitaj aktivuloj el ĉiuj generacioj.

Dimităr KAMENOPOLSKI

RUSE. La jarkunveno de la urba Societo „Libero“ akceptis decidojn pri plibonigo de la fakultativa lernado de Esperanto en la lernejoj, por plivastigo de la E-movado honore al la 100-jariĝo de la Internacia Lingvo. Por tiu celo oni antaŭvidas aperigon de propagandaj materialoj, konstruon de monumento de d-ro Zamenhof kaj de distrikta E-domo. Krome oni nomos straton en nia urbo je la nomo de L. Zamenhof.

Boris KAVALĜIEV

● Al la jarkunveno de la kooperativanoj-esperantistoj en Ruse venis multaj gastoj el la distrikto, el Ŝumen kaj Sliven.

Honore al la 100-jariĝo de Esperanto oni varbis preskaŭ 100 membrojn de la Bulgara E-Kooperativo kaj de la Sekcio. Sub la gvido de la fondinto de la sekcio kaj ĝia unua prezidanto Jordan Kalinov dum kvar jaroj aperis kvar numeroj de la sekcia bulteno „Danuba Kooperativa Horizonto“. Estis organizitaj kvar jaraj naciaj kooperativaj E-renkontiĝoj, al kiuj gastis esperantistoj el multaj distriktoj de nia lando kaj el ĝemel-urboj de Ruse en eksterlando. La sekcio organizis kelkajn kursojn por lernado de Esperanto en Ruse, en v. Slivo Pole kaj en u. Vjatovo. La sekcio helpis por fondo de la distrikta kooperativaj E-sekcioj en Ŝumen, Varna, Razgrad kaj Sliven, kun kiuj ĝi estas en amika konkurado honore al la 41-a kongreso de BEA kaj la 100-jariĝo de Esperanto.

La sekvan tagon post la kunveno la sekcio organizis la laŭvican ekskurson al Bukareŝto

por renkontiĝo kun rumanaĵ esperantistoj-kooperativanoj.

Jordan KALINOV

SMOLJAN-DISTRIKTO: ĈEPELARE. La loka E-societo „Diĉo Petrov“ nombras 100 membrojn.

Dank' al sia varia agado E-societo „Diĉo Petrov“ denove estas en la unuaj vicoj inter la distriktaĵ kaj landaj societoj.

Plimultiĝis la nombro de la societaj membroj, kiuj korespondas kun eksterlandaj samideanoj.

Unu el la formoj de kleriga-eduka laboro estas la E-elsendoj laŭ la loka radio. Ĉe la societo ekzistas du grupoj de amatora artagado.

Honore al la 41-a kongreso de BEA la societo aktive partoprenas la konkuradon kun aliaj E-societoj en la distrikto.

Maria DIĈEVA

SOFIO. En la Ministerio de Komunikado okazis la jarkunveno de la poŝtista esperantista societo „Heroldo“. Jarraporton faris la prezidantino inĝ. Sneĵana Terzieva. En siaj eldiroj la ĉeestantoj faris proponojn pri plibonigo de la laboro.

Estis lanĉita la ideo pri regula ĉiujara organizo de kursoj por lernado de Esperanto, de diversaj aranĝoj por plibonigo de la lingva nivelo de la malnovaj esperantistoj.

Ivan JORDANOV



Kiel interesaj estas la lecionoj de Esperanto! Ĉu ne tion esprimas la vizaĝoj de la novaj esperantistoj el naŭa klaso de mezlernejo „Diĉo Petrov“ en urbo Svoge, Sofio-distrikto? Ili lernas la Internacian Lingvon sub la gvidado de Elena Radenkova.

SOFIO-DISTRIKTO: SVOGE. Al la jarkunveno de societo „Amikeco“ gastis reprezentantoj de DE de BEA, lokaj sociagantoj, direktoroj de la lernejoj, instruistoj. La raporto konatigis la ĉeestantojn kun la interesa societa agado kaj bonaj rezultoj de la fakultativa lernado de Esperanto en mezlernejo „Diĉo Petrov“, en la studrondo ĉe la loka Junpionira Domo

kaj en la E-kursoj ĉe la societo. La esperantistoj en Svoge havas aktivan korespondadon kun samideanoj en la lando kaj eksterlande. Niaj societanoj gajnis premiojn en niaj landaj art-festivaloj. En mezlernejo „Diĉo Petrov“ estas fondita E-sekcio „Juna Esperantisto“ ĉe la Klubo de Internacia Amikeco. Ĉe la urba societo ekzistas sekcio „Iskâr“, en kiu membras junpioniroj kaj mezlernejanoj.

Elena RADENKOVA

SUMEN. Jam 79 jarojn la membroj de unu el la plej malnovaj landaj E-societoj — „Vekiĝo“, partoprenas en la monda movado por disvastigo de la Internacia Lingvo, batalas por paco kaj amikeco inter la popoloj.

Multaj el la societaj iniciatoj pasintjare estis dediĉitaj al la glora 40-jariĝo de nia socialisma patrolando. La anoj de „Vekiĝo“ kunlabore kun reprezentantoj de la Distrikta Komitato por Defendo de la Paco sendis al ĉiuj mondpartoj Malfermitan Leteron, en kiu ili rakontas pri la prospero de nia lando, distrikto kaj urbo. Bona estis la agado de klubo „Metalurgo“ ĉe la urba uzino „St. Stamenov“. Daŭras plu la rilatoj kun la esperantistoj el la ĝemel-urboj Magdeburg, Debrecen, Herson kaj Ustj nad Labem.

Cvjatko TODOROV



Al Temenujka kaj Danail Sinanski naskiĝis ĝemeloj. La feliĉa familio ricevis novan loĝejon. La patro Danail Sinanski estas aktivulo de E-societo „E. Apostolov“ ĉe la Panfabriko — Gabrovo.

ESPERANTO EN PANFABRIKO

Esperanto-societo „Evtim Apostolov“ en la Gabrova panfabriko estis fondita en 1980. La ideon donis la aktiva esperantistino Milka Janeva.

La direktoro de la fabriko Tonĉo Ĉarov kaj

la partia sekretariino Bonka Trifonova aktive subtenas la agadon de la societo.

La organizita dum 1980/1981 kurso donis bonegajn rezultojn. Ĝin partoprenis inĝenieroj kaj oficistoj.

De la komenco de novembro pasintjara en la fabriko denove funkcias E-kurso, kiun partoprenas 31 personoj.

La E-ekspozicio ĉe la fabrika enirejo vekis grandan intereson. Revuon „Bulgara Esperantisto“ abonis 28 personoj.

Pere de Esperanto en la uzino venas el la tuta mondo materialoj pri teknologio kaj produktado de la pano.

Stefka TOTEVA



Esperanto-studrondo ĉe la Ekonomia Kemia Kombinato en urbo Stara Zagora.

UNUA E-SOCIETO EN LA „RESPUBLIKO DE JUNULARO“

Tie — en la „Respubliko de junularo“, en urbo Grudovo, la 10-an de januaro 1985 estis fondita la unua E-societo en Stranĝa-Sakar, nomita „Cvjatko Radojnov“.

Kiel ĝia prezidanto estis elektita Bojin Vuĉev — gvidanto de la urba E-kurso por komencantoj.

Al ĉiuj membroj de la nova societo DE de BEA en Burgas bondeziras sanon kaj sukcesojn en ilia E-agado.

E. STOJKOVA

HELPU ORGANIZI!

E-rondeto „AMIKECO“ el Ĉeská Trebová (Ĉeĥoslovakio) aranĝos komence de septembro 1985 letervesperon okaze de 25-jara datreveno de sia fondiĝo. Ĉiuj salutsendaĵoj el la tuta mondo estos respondataj per bela broŝuro pri nia urbo. Unu letero estos lotumita kaj al la sendinto ni garantias 7-tagan senpagan restadon en nia urbo. Skribu al: Cilka Kotyzová, Drobneho 1112, CS-560-02 — Ĉeská Trebová, ĈSSR.



DEZIRAS KORESPONDI

SOVETIO

Ivanova Nataša — 252143 Kiev 143, ul. Zabolotnogo 16—8, tel. 66-18-34 — pri muziko kaj diversaj problemoj.

Tregub Tatjana (24-jara instruistino) — 252037 Kiev 37, ul. Iv. Klimentko 4, kv. 24 — pri muziko, sporto k. a.

Jelena Vasiljeva — Voronejskaja obl., Devickij r-n, sovhoz „Kuĉugurovskij“ — pri saniga korpokulturo, pri kuracaj herboj kaj „hata jogo“.

Vasov Aleksandr — 606600 Gorkovsk. obl., urbo Semenov, ul. Družba d. 71 — dez. kor. kaj interŝ. BK kaj PM.

Spungina Nataša — 603097 urbo Gorkij, ul. Vanjeeva 98-29 kor. 1—dez. kor. kaj interŝ. BK, PM.

Olga Nostjuk (33-jara — ul. Dobrovoljskogo, 18A, 357340, gorod Lermontov, Stavropoljskogo kraja, Norda Kaŭkazio — pri krucevortenigmoj, detektivaj romanoj, muziko, kolektas kolorajn BK kaj kalendariojn.

VJETNAMIO

Trinh phi Cuong (25-jara instruisto, fraŭlo) — XI ngħp Xâg lăp, Sô thuy San Kiengiaag, Rail gia — pri literaturo, lingvoj, psikologio, fotografio kaj sporto.

NI KONDOLENCAS

La 25-an de januaro 1985 en Jambol subite forpasis la malnova esperantistino

EKATERINA IVANOVA KAMBUROVA

en sia 47-jara aĝo. Ŝi estis aktiva membro de la agararana E-societo „Aŭroro“ en Jambol, partoprenis multajn E-iniciatojn — diversajn renkontigojn kaj kongresojn. Per sia bona karaktero, helpemo kaj sciamoj, Ekaterina Kamburova restos por ĉiam en la koroj de tiuj, kiuj konis kaj amis ŝin.

E-Societo „AŬRORO“

La 2-an de februaro 1985 en la aĝo de 83 jaroj forpasis la esperantisto-veterano

DANĈO IVANOV DANOV

el urbo Ŝipka, distrikto de Stara Zagora. Li estis unua prezidanto de la E-societo en Ŝipka (tia li fariĝis la 1-an de majo 1925).

ENHAVO

* * * Forpasis K. Ĉernenko	II
* * * Mihail Gorbacov — ĝenerala sekretario de CK de KPSU	II
P. STANĈEV. La venko	1, 2
Ĥr. GOROV. Niaj E-kongresoj	2, 3
D-ro J. POPOVA. Eterna amikeco	3, 4
D. ĤITROV. „Milito sen pafo“	5
I. VELĈEV. Balado pri la soveta soldato	6
* * * La granda misio de Metodio	7, 8
L. MIĤAJLOV. Pri la prefikso, prepozicio kaj akuzativo	8
* * * Beletro kaj poezio	9, 10
V. CVETKOVA. Japanio — malproksima kaj proksima	11, 12
T. LAKOVA. Akademiano Sergej Boev 80-jaraĝa	13
* * * Enlanda movado	14, 15, 16
* * * Deziras korespondi	III
P. PEJĈEV. „Antitab“ — ĉu helpas?	IV

Sur la unua kovrilpaĝo:

Floro por la herooj-liberigintoj. Foto: Lada MILKOVA

KUNLABORANTOJ, ATENTU!

Se vi volas sendi kontribuojn por „BE“, ĝi estu konciza, verkita en bona lingvo, klare tajpita aŭ mane skribita, kun duobla interlinia spaco kaj margeno (sen mallongigoj, sen tutaj vortoj tajpitaj per majuskloj). La materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en tre gravaj kazoj — ĝis 90 linioj sur blankaj paperoj de normala formato. Ĉiu tajpita linio konsistu el 65 tajposignoj (inkluzive la intervortajn spacojn).

La Redakcio akceptas la originalan (unuajn) ekzempleron de la tajpaĵo, ne la kopion. Skribu klare viajn nomojn kaj kompletan adreson en nacia lingvo!

Korespondadojn pri okazintaj aranĝoj oni sendu ĉiam tuj post la aranĝo. La grupfotoj estu interesaj, movoplenaj, bonkvalitaj (prefere nigra-blankaj), en poŝtkarta formato.

Limdato por kontribuadoj: La materialoj venintaj ĝis la 15-a de ĉiu monato, aperos en „BE“ post du monatoj.

La redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn!

VIZITU VILNIUS!

Se vi intencas viziti la litovan ĉefurbon Vilnius, nepre kontaktu kun junulara E-klubo „Juneco“. „Junecanoj“ ĉiam plezure gvidos vin tra la urbo, konatigos al vi litovian junularan E-agadon.

Adreso: E-klubo „Juneco“ P. O. Box 61, 232000 VILNIUS-C, Litovio. Ni atendas vin en la ĉefurbo de Litovio!

En n-ro 4/1985 de „Bulgara Esperantisto“ en la titolo „Konferenco pri junularaj problemoj“ sur paĝo 3 estas allasita malagrabla preseraro. La redakcio pardonpetas la legantojn.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BĀCEV, Vasil BOROVANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitar HAĜIEV, Krăstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodio“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66

1 000 Sofio

„ANTITAB” — ĈU HELPOS?



De de BEA en urbo Plovdiv elektis kiel delegiton de la 41-a Kongreso de BEA prof. d-ron Pejĉo Pejĉev. Li naskiĝis en 1916, en urbo Bălgarovo, distrikto de Burgas. Studis en la Sofia Medicina Fakultato. En la komenco de 1945 li forveturis kiel volontulo al la fronto en Hungario kaj partoprenis la duan fazon de la Patrolanda Milito. En 1947 li fariĝis asistanto en la Katedro pri Farmakologio en la novefondita Medicina Fakultato en urbo Plovdiv. Ekde 1963 li estas profesoro kaj gvidanto de la supremenciita katedro.

Prof. Pejĉev jam kiel gimnazia lernanto lernis memstare Esperanton. Nun li estas membro de la Distrikta Estraro de BEA en Plovdiv kaj ano de la Medicina Esperanto-Societo en la sama urbo.

Prof. Pejĉev publikigis multajn sciencajn verkojn kaj estas aŭtoro de 10 raciigoj kaj 6 inventoj. La inventita de li kaj kolektivo sub lia gvidado preparaĵo „Antitab” (kontraŭnikotinaj cigaredoj) estas rekonita kiel inventaĵo. Nun tiu ĉi preparaĵo estas produktata de la ekonomia entrepreno „Globus”, funkcianta ĉe la Distrikta Organizaĵo de BEA en Plovdiv.

Ci-apude legu artikolon de prof. P. Pejĉev pri la preparaĵo „Antitab”.

La plej amase disvastigita toksomanio estas la tabakismo, pro tio ĝi estiĝis tre grava objekto de observado fare de la Tutmonda Sanprotektita Organizaĵo.

En la mondo oni praktikas diversajn metodojn kaj rimedojn por kontraŭbatali la tabakfumadon.

Ĉe ni en Bulgario ekzistas ŝtataj ordonoj kaj aranĝoj kontraŭ la tabakfumado en publikaj lokoj. Krom tio ankaŭ estas aplikataj kun kuraca celo la preparaĵoj „Tabeks” (produkto de Farmahim) kaj la antitabakaj cigaredoj „Antitab” preparitaj el drogherboj.

Oni povus demandi: ĉu estas eble kontraŭbatali la tabakfumadon per drogherboj?

Nia ĝisnuna sperto pruvis, ke tio ĉi estas ebla.

La preparaĵo „Antitab” estas nova drogherba komponaĵo. Ĝi posedas ĉiujn eksterajn kvalitojn de la ordinara tabaka cigaredo, imitas la psikan staton ĉe tabakfumado kaj ankaŭ la ligitajn kun ĝi gestojn kaj kutimojn.

Per tiuj ĉi siaĵecoj „Antitab” neniigas la emocian enhavon de ĉiuj refleksoj asociitaj kun la tabakfumado kaj iom post iom ili malaperas.

La efikon de la antitabaka cigaredo oni elprovis en klinikaj kondiĉoj sur 140 fumantoj-volontuloj. El ili 122 estis viroj kaj 18 virinoj. La plimulto el ili estis tre pasiaj fumantoj. Ilia aĝo variis de 21 ĝis 70 jaroj kaj la longedaŭro de ilia fumada praktiko — de 6 ĝis 51 jaroj.

Rezulte de la klinikaj elprovoj estis konstatite, ke la fumo de la drogherba cigaredo aliiĝas la guston de la tabaka cigaredo kaj ĝi estiĝas neagrable por la fumanto. Krome, uzante la drogherban cigaredon, oni elportas tre facile kaj sendolore la abstinencan krizon pro ĉesigo de la tabakfumado.

Post tri monatoj ni faris enketon kaj konstatis, ke en la observata grupo 63% el la fumantoj ĉesis fumi. Do la klinika eksperimento pruvis, ke laŭ la metodo de fitoterapio oni povas sukcese kuraci la tabakismon.

La drogherbaj cigaredoj „Antitab” estas helpe fitoterapia rimedo en la batalo kontraŭ la nikotina dependeco. Dank’ al sia specifa drogherba enhavo „Antitab” ege malpliigas la deziron tabakfumi. Ĝia tasko estas faciligi forte pasiigintajn tabakfumantojn venki la malagrablan sentadon dum la nikotina abstinencia krizo.

La cigaredoj „Antitab” ne kreas alpasiiĝon.

Tamen por stabiligo de la atingita efekto tre gravan rolon ludas la ĉirkaŭantaro. La rilato de geamikoj, gekolegoj ktp. povas helpi la klopodojn de la fumanto liberiĝi de la nikotinismon aŭ male — ili povus neniigi la bonan rezulton.

